IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031
Jarkolekto 55 - trimonata
2025/2

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:
József Németh (red.)
Mireille Grosjean
Luigia Oberrauch Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Rob Moerbeek

Kunlaborantoj de la aktuala numero:
Laura Brazzabeni
Margherita D'onofrio
Mireille Grosjean
Jozefo Horvath
Zsófia Kóródy
Márta Kovács
Alessandra Madella
Ahmad Reza Mamduhi
Nicole Margot
Françoise Noireau



Renato Corsetti (1941-2025)



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Enkonduko (Ahmad Reza MAMDUHI) 3
Renato Corsetti forpasis (A.R. MAMDUHI, M. D'ONOFRIO, A. MADELLA) 4
Jozefo HORVATH: *Dilemoj de la Esperanta leksikografio en Hungario*.... 10
Françoise NOIREAU: *Distanca Esperanto-kurso* 17
Mireille GROSJEAN: *Instruado en Afriko – defio kaj evoluo* 21
Claude Gacond kiel pedagogo (Nicole MARGOT, Mireille GROSJEAN) 27
Lernejoj kaj demokratio (Mireille GROSJEAN)..... 28
El la landoj kaj sekcioj (CN, DE, HU) 30
La 58-a ILEI-kongreso en Beogrado (informoj, alvoko) 35
Informoj pri ILEI kaj IPR..... 37

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Ahmad Reza MAMDUHI, Nr. 9, K. Iraj, Kh. Dowlatshad Gharbi, Kh. Farid-Afshar, Kh.Vahid Dastgerdi, Tehran-1916613514, Irano. Tel. +98 9122115419 (Telegram, WhatsApp). <*mamduhi@gmail.com*>. Universitata agado, ekstera komunikado kaj varbado, observanto kaj komitatano A ĉe UEA.

Sekretario: Elena NADIKOVA, ul. Kadikova, 24-41, RU-428037 Ĉeboksari, Rusio, Tel. +7 919-670-25-34. <*lena_espero@mail.ru*>. Lerneja agado.

Estrarano pri financoj: Karine ARAKELJAN, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio. *ilei.kasisto@gmail.com* (financoj). Tel.+374 55 279906 (Viber, WhatsApp), <*karinko_arm@mail.ru*>. Ekzamenoj.

Vic-prezidanto: Alessandra MADELLA, via Prampolini 8, IT-43122 Parma, Italio. Tel. +39 0521 785582, <*a.madella@tiscali.it*>. Lerneja, universitata, scienca, landa kaj regiona agadoj (Orienta Azio), ekstera komunikado kaj varbado.

Estrarano pri kongresoj: Laura BRAZZABENI, via San Filippo 52, IT-58031 Arcidosso (GR), Italio. <*laura.brazzabeni@gmail.com*>. Tel. +39 3286461063 (WhatsApp). Lerneja agado.

Estrarano: Marija JERKOVIĆ, Jarunska 6, HR-10000 Zagreb, Kroatio. Tel. +385 981771741. <*mjerkovic@net.hr*>. Lerneja kaj landa agadoj.

Estrarano: Fernando PITA, R. S. Francisco Xavier, 681, bl E, ap 201, Maracanã - cep: 20550-011, Rio-de-Ĵanejro, Brazilo. <*magisterpita@gmail.com*>. Tel. +55 21 98863-3854 (Telegram, WhatsApp). IPR, universitata kaj scienca agadoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobodjenja 36/14, RS-32000 Čačak, Serbio. <*radojica.petrovic.rs@gmail.com*>. Tel. +381 64 8525321 (Viber, WhatsApp, Telegram). Eduk-projektoj, universitata agado, instrukapabligado.

Estrarano: Aimé-Patrick MANIRAKIZA, Buhomba 7 Nr 39, Maramvya, Bujumbura, Burundo, Tel. +25779813485 (Whatsapp, Telegramo), <*apmanirakiza@gmail.com*>. Agado pri Afriko, observanto ĉe TEJO.

Scienca Komitato

***Prezidanto*: Humphrey Tonkin**, Usono, University of Hartford
***Membroj*:**
Duncan Charters, Usono, Principia College, Elsah; AdE[1]
Renato Corsetti (✞), Britio/Italio, Università degli Studi di Roma „La Sapienza"; AdE[1]
Probal Dasgupta, Barato, emerita profesoro de LRU, Indian Statistical Institute, Kolkata; AdE[1]
Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių universitetas
Boris Kolker, Usono; AdE[1]
Ilona Koutny, Pollando/Hungario, Uniwersytet im. Adama Mickiewicza w Poznaniu
Stefan MacGill, Nov-Zelando/ Hungario
Aleksandr Melnikov, Rusio, Академия Сельскохозяйственного Машиностроения, AdE[1]
Radojica Petrović, Serbio, Univerzitet u Kragujevcu
Balázs Wacha, Hungario, MTA Nyelvtudományi Intézet

[1] AdE – Akademio de Esperanto

Sur la titolpaĝo:
Renato Corsetti forpasis (vd. la rememorajn artikolojn sur p. 4.)

Sur la dorskovrilo:
Instruado en Afriko - Defio kaj evoluo (vd. la prelegon de Mireille Grosjean sur p. 21.)

Enkonduko

Karaj legantoj!
Ni funebras la forpason de profesoro Renato Corsetti, elstara esperantisto kaj multjara gvidanto de nia movado. Liaj kontribuoj al E-o estis vere universalaj kaj profundaj, i.a. instruado kaj mentorado de novaj esperantistoj. A. Madella, Margherita D'Onofrio kaj mi pentras por vi iomete pri pluraj facetoj de tiu rimarkinda homo.

Ankoraŭ sekve de liaj streboj, ni inspiriĝas per la admirinda laboro de Françoise Noireau por Afriko. Ŝia kreiva utiligo de Vacapo por faciligi distancan instruadon en malfacilaj kondiĉoj montras kiel engaĝiĝo kaj persistemo povas superi konsiderindajn obstaklojn. Ŝi kunlaboras kun sep aliaj instruistoj por proponi Eo-kurson al multnombraj studentoj en Kongolando kaj aliaj afrikaj landoj.

La artikolo de Jozefo Horvath donas al ni interesan perspektivon pri la dilemoj de Esperanta leksikografio en Hungario, memorigante nin pri la gravegeco de bonaj vortaroj por la instruado.

Ni ĝuas ankaŭ la allogan skribaĵon de Mireille Grosjean pri lernejoj kaj demokratio, plu sciiĝas pri Claude Gacond kiel pedagogo pere de Nicole Margot, kaj lernas pri la efika agado de A. Madella en Zaozhuang, Ĉinio, kie studentoj nun ne nur lernas E-on sed ankaŭ studas aliajn studobjektojn pere de ĝi.

Ne maltrafu la anoncon pri la venonta 58-a ILEI-kongreso en Beogrado, Serbio (19-a-26-a julio 2025), kun ĝia kleriga, kultura kaj distra programo. La ĉi-jara ĉeftemo de nia Kongreso, same kiel tiu de nia Simpozio, estas „Artefarita intelekto kaj lingvolernado" – tre aktuala temo por nia instruista komunumo. Bonan legadon!

Ahmad Reza MAMDUHI

Renato Corsetti forpasis

de Ahmad MAMDUHI, Prezidanto de ILEI



Kun profunda malĝojo ni eksciis pri la forpaso de nia kara samideano profesoro Renato Corsetti (1941 – 2025), elstara esperantisto kaj multjara gvidanto de nia movado, kiu dediĉis sian tutan vivon al la disvastigo de Esperanto kaj interkultura dialogo.

Kiel prezidanto de ILEI, mi volas esprimi nian plej sinceran kondolencon al lia familio kaj al la tuta esperantista komunumo. Renato estis vere unika persono, kiu laboris senĉese por konstrui pontojn inter kulturoj kaj homoj tra la tuta mondo. Liaj kontribuoj al la Esperanto-movado estis mult-flankaj kaj profundaj - de lia gvidado de UEA ĝis lia senlaca instruado kaj mentorado de novaj esperantistoj.

Lia engaĝiĝo por Esperanto estis vere universala – li neniam distingis inter landoj, kulturoj aŭ sociaj klasoj. Por li, ĉiu homo egale meritis la ŝancon ekkoni, lerni kaj uzi Esperanton. Lia kapablo kunigi homojn trans ĉiuj baroj estis eksterordinara, kaj lia varma personeco kaj sincera kredado je la idealoj de Esperanto inspiris generaciojn de esperantistoj.

En sia rolo kiel eksprezidanto de UEA kaj aktivulo en multaj aliaj esperantistaj organizoj, Renato montris al ni kiel efike kaj inkluzive gvidi nian movadon. Lia scienca laboro pri lingvistiko, psikolingvistiko kaj interlingvistiko pliriĉigis nian komprenon pri la rolo de Esperanto en la moderna mondo.

Lia heredaĵo daŭre inspiros nin en nia laboro por lingva justeco kaj interkultura kompreniĝo. Ni honoros lian memoron plej bone per daŭrigo de

lia vizio pri mondo, kie Esperanto servas kiel ponto inter ĉiuj popoloj, kaj per konstanta strebado al la idealoj, kiujn li tiel forte defendis.

Ni restos por ĉiam dankemaj pro lia nekredebla kontribuo al nia movado kaj al la idealo de tutmonda interkompreniĝo. Liaj instruoj kaj ekzemplo daŭre gvidos nin antaŭen.

Ripozu pace, kara Renato. Via kontribuo al nia movado restos neforgesebla, kaj via spirito vivos plue en la koroj de ĉiuj, kiuj havis la privilegion koni vin.

Maŭro kaj Renato: amikoj dum la tuta vivo

de Margherita D'ONOFRIO (edzino de Maŭro La Torre)

La lastatempa forpaso de Renato reprezentas por mi grandan perdon, ne nur por liaj intelektaj kaj homaj kvalitaj, sed ankaŭ ĉar kun li malaperas parto de Maŭro.

Renato por Maŭro estis la elektita frato, la amiko de la koro kaj de la racio.

Kiel liceano Maŭro vizitadis la preĝejon „Cristo Re" de Romo, kie oni instruis kursojn de Esperanto, kun la konsento de la paroĥestro Jacobitti, kaj kien iam alvenis Renato. Sed vizitadis la kurson precipe homoj ne tiel junegaj kiel ili estis, do ili decidis formi grupon en la vojo De Carolis (kvartalo Balduina), kie ekis intensa agado de varbado ĉe amikoj kaj parencoj, inkluzive de la fratino Clelia La Torre, kiu tiel rakontas:

„Pli malpli ĉirkaŭ 1968-69 Maŭro persvadis min partopreni en esperantista internacia kongreso, kiu devis okazi somere en Aix-en-Provence. Mi volonte akceptis, ankaŭ pro la scivolemo koni mediojn malsamajn de tiuj, kiujn mi kutime frekventis en Romo. Dum la tuta periodo li alparolis min nur en Esperanto kaj mi devis iom elturniĝi kiel mi povis per la malmultaj vortoj, kiujn mi konis, miksitaj al tiuj de aliaj lingvoj, kiujn mi studis en lerneja kunteksto.

Mi estis ĉirkaŭ 18-jaraĝa kaj por mi tio estis grava sperto, dank' al kiu mi poste daŭre frekventis la esperantistan medion de Romo."

En '68 ĉe Montecatini okazis itala kongreso kaj junulara eŭropa kongreso, kiu vidis la partoprenon de junuloj el multaj partoj de Italio: krom Maŭro kaj

Renato, Nino Vessella, Michela Lipari, Gianfranco Molle, Riccardo Pinori, nur por memori kelkajn el ili.

La sesdekaj jaroj estis tiuj de la junulara ribelo kontraŭ la aparatoj de la reganta potenco kaj iliaj ideologioj. Oni esperis povi konstrui pli bonan mondon. Maŭro kaj Renato identigis en la disvastigo de Esperanto, lingvo de paco, la eblecon kontribui al ties konstruado.

Ekde la momento, en kiu ili konatiĝis, ili ĉiam parolis en Esperanto, kvankam ili ambaŭ estis italoj. Tiu konviko neniam forlasis ilin, malgraŭ la kritikoj koncerne Esperanton fare de fakuloj kaj nefakuloj, en kelkaj kazoj profundegaj kontraŭecoj sen racia bazo.

En 1984 estis publikigita la libro *Esperanto, corso di base* (*Esperanto, baza kurso*), verkita de Maŭro, Renato kaj Nino Vessella, kun belega prefaco de Giorgio Cardona, profesoro pri lingvoscienco ĉe la Universitato de Romo. En tiu kurso videblas la influo de la antaŭa historia periodo. Ne hazarde, je la komenco ni trovas tiun citaĵon de Mao Zedong:

... kaj se ni prenas Esperanton kiel vehiklon de la internaciisma ideo kaj de la revolucia ideo, tiel Esperanto povas esti lernata kaj devas esti lernata.

Maŭro kaj Renato restis en kontakto dum sia tuta vivo. Dum kelkaj periodoj ili telefonis unu al la alia ĉiu-vespere por konfrontiĝi pri la teoriaj kaj praktikaj problemoj, kiujn ili devis sinsekve alfronti. (Ili tiom longe okupis la telefonojn de la respektivaj hejmoj, ke ili kaŭzis grandan ĉagrenon en siaj familioj). Ilia diskutado pludaŭris ankaŭ en hospitalo, en la lasta periodo de la vivo de Maŭro.

Renato kaj Maŭro kundividis la elekton paroli kun siaj gefiloj Esperanton ekde la naskiĝo. Tiu temo estis la objekto de granda diskutado, precipe por Renato, en kies familio ili parolis 3 lingvojn (la anglan, Esperanton kaj la italan). Ĝuste la studoj de Renato pri trilingvismo portis lin al scienca posteno ĉe la Universitato „La Sapienza" de Romo.

Koncerne nian familion, kvankam mi mem ne parolas Esperanton, mi ĉiam subtenis, ke Maŭro parolu ĝin kun nia filino ekde ŝia naskiĝo. Dank' al tio, nia filino havis la eblecon amikiĝi kun infanoj kaj adoleskantoj de la tuta mondo, kun kelkaj el kiuj ŝi ankoraŭ estas en kontakto.

Jam de tiam mi komprenis la multajn potencialojn, kiujn tiu elekto malfermos por ŝi: ilon por internaciaj interŝanĝoj kaj komunikado en situacio de egaleco; pli grandan facilecon de la lernado de Esperanto kompare kun

aliaj lingvoj, kiel montras per sia laboro la gajnintoj de la ĉi-jara eldono de la Premio La Torre; maturigon de idealoj kiel pacifismo kaj frateco.

L. L. Zamenhof fakte verkis en 1912: *„sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton.*".

Li bone sciis tion, ĉar li kreskis en Bjalistoko, urbo regata de la konfliktoj inter malsamaj etnaj grupoj, kiuj diferenciĝis pro diversaj politikaj, sociaj, lingvistikaj kaj religiaj pozicioj (la ortodoksaj rusoj, la jid-lingvaj judoj kaj la katolikaj poloj).

La poetino Patrizia Cavalli, dum sia parolado ĉe ICI Berlino, deflanke de la kunveno pri la fama itala verkistino Elsa Morante, diras tion ĉi pri la rilato inter la lingvo kaj la konstruado de la mondo:

„Kontraŭ tio, kion Elsa deklaras, ke la realo produktas la vortojn kaj ne male, tio fakte ne estas la vero. Ŝi tre bone scias, ke ne estas tiel".

Ankaŭ por ŝi, kiel por ni, la lingvo igas la mondon kaj, kiel faras Esperanto, ĝi povas ankaŭ igi ĝin pli bona.

Kiom Renato Corsetti helpis la Ligon

de Alessandra MADELLA, Vic-prezidanto de ILEI

En siaj belaj kontribuoj Margherita La Torre kaj Ahmad Mamdhui pentris al ni la idealisman flankon de Renato Corsetti, kiu klare videblis jam de lia juneco kaj gvidis lin dum lia tuta vivo en Esperantujo. En mia memoro, mi ŝatus male paroli pri lia granda praktika senso kaj pri tio kiom multe ĝi helpis la nunan estraron de ILEI. Lia kerna ideo ĉiam estis, ke la estraro de internaciaj organizoj kiel ILEI ne vere gravas, ĉar kiu vere povas fari la laboron surloke, instrui kursojn kaj enigi la lingvon en lernejojn ktp, estas la landaj sekcioj. Pro tio, la unua grandega helpo, kiun li donis al la nuna estraro, estis rekte kontakti homojn por restarigi ne plu funkciantajn sekciojn, malfermi novajn kaj ĝenerale havi klaran ideon pri la membraro. Tion li unue faris kun mia asisto kaj poste kun Marija Jerković, kiu surprenis la rolon de estrarano pri Landa Agado kaj regule korespondis kun la sekcioj, regule petante nomojn kaj raportojn. Renato ankaŭ ĉiam multe kuraĝigis kaj laŭdis Hamzeh Shafiee en lia rolo de membro-administranto.

La dua granda helpo de Renato estis kompreni la gravecon de reta instruado. Pro tio li konsilis al Ahmad Mamduhi utiligi la Zoom-subskribon de Irana Esperanto-Asocio por la kreado de la projekto „EToSo", kiu en sia nomo mem („Esperanto-Kursaro Tibor Sekelj") montras la rilaton kun la samnomaj pioniraj agadoj de Maŭro La Torre en tiu kampo. La projekto koncernis unue la instruadon de Esperanto en lingvoj, por kiuj malfacilas trovi surlokan instruiston, sed ĝi baldaŭ superis tiujn limojn pro la efektive urĝa bezono de retaj kursoj en la periodo de la kronviruso.

Ankaŭ en tiu kazo, Renato ĉiam kuraĝige substrekis la grandan rolon, kiun instruistoj ludas en la motivado de lernantoj, por ke ili pli scivolu pri Esperanto kaj volonte alproksimiĝu al Esperanto-organizoj post la kompletigo de la baza kurso. Kiel li rimarkigis en unu el siaj lastaj prelegoj, publikigita en la *Aktoj de la Simpozioj de ILEI 2022-2023*, Duolingo ŝanĝis la panoramon de reta lingvo-lernado, abrupte allogante al Esperanto multe da lernantoj. Sed malmultaj el ili restas aŭ daŭrigas sian studadon pro manko de tiu interago kun gvida instruista figuro, kiun la projekto „EToSo" male oferas. Substrekendas ĉi-rilate ankaŭ kiel Renato elektis ĝuste la parton „Motivigo" por sia kontribuo al la video-kurso de Esperanto „30 Oraj Horoj" de ILEI kaj Itala Esperanto-Instituto, kiu celas instruistojn de superaj mezlernejoj, kiuj povus poste instrui la lingvon al siaj lernantoj.

La tria granda subteno, kiun Renato donis al la estraro de ILEI, estis en la daŭrigo kaj starigo de la internaciaj konkursoj de la Ligo: „Premio La Torre" kaj la konkursoj „Instruisto de la Jaro" kaj „Juna Instruisto de la Jaro." Li vidis en la Premio ne nur manieron honorigi la elstaran figuron de sia kara amiko Maŭro La Torre, sed ankaŭ rimedon por stimuli seriozajn esplorojn, kiuj povu esti praktike uzeblaj por instruistoj. Li ekzemple multe ŝatis la aliron de Emmanuelle Richard kaj Axel Rousseau, la gajnintoj de la ĉi-jara eldono de „Premio La Torre", kiuj statistike pruvis, ke la tempo bezonata por sukcese fini la retajn kursojn de *Espéranto France* estas multe pli mallonga ol tiu bezonata por atingi la saman nivelon en lernejaj kursoj de la angla.

Tiu esploro certe rememorigis lin pri la eksperimenta instruado de Esperanto en malriĉaj kvartaloj de Romo, kiun li komencis kun Maŭro La Torre kaj kiu donis similajn rezultojn pri la efektiva facileco lerni Esperanton. Simile, ankaŭ lia vido de premiindaj „Instruistoj de la Jaro" certe enhavis la necesan pripenson kiel praktike uzi la novajn teknologiojn, kiuj malfermis por ni tiom multe da ebloj kaj defioj.

La kvara granda helpo estis pri la pli efika uzo de la ret-listoj de ILEI, kio inkluzivas la restarigon de la listo „e-ins”, kaj paralele pri la kreado kaj mastrumado de ret-listo de universitatanoj. Li simile havis la ideon utiligi la Zoom-konton de Irana Esperanto-Asocio por ĉiu-monata „Kunpens(ig)ado pri Esperanto en universitatoj”, kiu ebligu la interŝanĝon de spertoj kaj la ekvidon de novaj ebloj por la instruado de, pri aŭ en Esperanto en universitata medio. Certe la sankta pacienco kaj la vastaj personaj rilatoj de Renato igis lin la ideala homo por gvidi tiujn renkontiĝojn, kiel li regule faris, ĝis li estis tro malsana por povi daŭrigi.

Ankaŭ pro la fakto, ke lia filo longe loĝis en Ĉinio, li havis multe da simpatio por la laboro de ĉinaj universitatanoj kaj multe da atento pri la evoluoj en tiu lando. Sed li ĉiam substrekis, ke Ĉinio devus pli serioze kaj radikale apliki sian penson pri la Silka Vojo al Esperantujo, konkrete helpante la disvolvon de Esperanto en la najbaraj landoj, kie ĝi estas ankoraŭ preskaŭ ne-konata. Kaj li ĉiam ĝoje bonvenigis pozitivajn evoluojn de afrikaj kaj aliaj triamondaj landoj, kiuj portis junecon kaj entuziasmon al nia movado.

Konklude, ne vere eblas en malmulte da vortoj memori ĉiujn helpojn, kiujn Renato donis al la estraro de ILEI, kaj al la Ligo ĝenerale, dum la pasintaj jaroj. Liaj agadoj estis ĉiam vastaj, profundaj kaj varme personaj. Ni certe ne kapablos rekonstrui ilian kompletan bildon, sed eĉ per ĉi tiu mallonga skizo ni povas eble komenci kompreni la gravecon de lia plurnivela kontribuo.

Mi nur ŝatus fini per persona memoro koncerne lian subtenon por mia libro *Esperanto: Facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*. Ĝi havas kiel unu el siaj kernoj la ideon de metalingvistika kompetento, kiun Renato kaj Maŭro La Torre adoptis dum siaj romaj esploroj pri la efektiva facileco de la lernado de Esperanto. Tamen, tre tipe, ankoraŭ resonas en mia kapo liaj vortoj de admiranto de la klerisma klareco de Voltaire (kaj edzo de Anna Löwenstein de uea.facila), ke oni devus eviti la uzon de malfacilaj vortoj kiel „metalingvistika”, ĉar „translingva” tute sufiĉas. Espereble ni sukcesos sekvi lin ankaŭ sur tiun vojon.

Dilemoj de la Esperanta leksikografio en Hungario[1]

Esperanto-vortaroj en Hungario

de Jozefo HORVATH (Hungario)



La rolo de vortaroj en la instruado

En la instruado de lingvoj lernolibroj havas centran rolon, kompreneble, krom la instruistoj. Tio validas por la komenca periodo de lernado, en la lernolibroj troviĝas ja krom gramatiko ankaŭ vortolistoj. Sed en la pli malfrua periodo de lernado la vortouzo, kaj tiel la vortaroj havas decidan rolon kiel orientiloj. Bonaj aŭ malbonaj vortaroj povas influi por jardekoj la vortouzon, almenaŭ en la malpli altaj niveloj de lingvoscio. Malgraŭ tio la vortar-uzo havas relative neglektatan rolon en la lingvopedagogio, kio ne mirindas, ja la ĉefa celo estas komuniki, uzi la vortojn. Sed ĝuste tio ne eblas sen konvenaj vortaroj. Do vortaroj meritas pli grandan atenton.

Vortaroj en la komencoj kaj en naciaj kadroj

La bazon de la Esperanta leksikografio metis sendube Zamenhof per sia „Internacia-rusa vortaro", aŭ kiel nun ni dirus „Esperanta-rusa vortaro". Ĉi tiu vortolisto aperis en 1887 en la broŝuro „Unua libro" aŭ pli precize „Международный языкъ". La radiklisto entenis pli ol 900 vortradikojn, afiksojn kaj finaĵojn. Ĝi konsistigis poste la bazon de „Universala Vortaro", aperinta en 1894, kiu jam entenis 2657 radikojn, kaj eniris la netuŝeblan „Fundamento de Esperanto", akceptitan en 1905.

La libron hungarigis Paŭlo Lengyel en 1909[2], ĝia moderna versio pretiĝis en 2006 en la traduko de Jozefo Horvath[3].

---

[1] Ĉi tiu prelego estis prezentita dum la konferenco de 2024-11-06, dediĉita al la memoro de prof. István Szerdahelyi en la budapeŝta Universitato Eötvös Lóránd.
[2] L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto, Eldono hungara (Az Esperanto Alapkönyve), trad. Paul de Lengyel, Librairie de Hachette et C^ie^, Paris, Budapest, Kókai Lajos könyvkereskedése, 1909.
[3] L. L. Zamenhof: Fundamento de Esperanto, Eldono hungara (Az eszperantó fundamentuma), trad. Jozefo Horvath, Flandra Esperanto-Ligo, Antverpeno, 2006.

La unua memstara, ne vortolisteca Esperanta-hungara vortaro aperis en 1909. Ĝin redaktis la gimnazia instruisto Péter Török (1857-1929) en Debrecen kun la ambicia titolo „Esperanto-hungara plena vortaro”[4]. La unuan dudirektan vortaron kompilis la arĥitekto János Tomán (1900-1999) resp. en 1923[5] kaj 1924[6].

La aperigon de pli grandaj vortaroj en Hungario ebligis la normiga efiko de „Plena Vortaro de Esperanto” de Émile Grosjean Maupin kun ties „Suplementoj”, redaktitaj de Gaston Waringhien kaj „Plena Gramatiko de Esperanto” de Kalocsay-Waringhien.

Tiel aperigis la ŝtata eldonejo en 1958 la Esperantan-hungaran vortaron[7] de Alfonz Pechán (1902-1994), kiu estis la plej ofte kaj vaste uzata poŝvortaro kune kun sia hungara-Esperanta parto. Poste ĝi ricevis plurajn ampleksigojn fare de Pálma Csiszár, Thierry Salomon, la geedza paro Molnár kaj aliajn sub la zorgado de Veronika Héé.

La daŭrigo

La unua, signife pli ampleksa, nun jam kompendia vortaro aperis en presita formo, post longa preparado, en 1996 sub la redakto de István Szerdahelyi kaj Ilona Koutny[8]. Ĝin eldonis Hungaria Esperanto-Asocio. Ĝian kompiladon ebligis tiu lingvistike kvalifikita teamo, kiu formiĝis danke al la Esperanto-fako, fondita de prof. István Szerdahelyi en la budapeŝta universitato ELTE.

Szerdahelyi estis pedagogo kaj renesanca homo en la senco, ke li kultivis preskaŭ ĉiujn terenojn de interlingvistiko kaj esperantologio, i.a. ankaŭ leksikologion. Estas konataj liaj polemikoj kun Kalocsay kaj la Akademio de Esperanto pri la vortspeca karaktero de la radikoj (laŭ lia opinio la vortspecan karakteron de la radikoj donas la morfemoj, markantaj la gramatikan kategorion aŭ sintaksan funkcion). Signifaj estas liaj studoj pri la etimologio de Esperantaj vortoj. Ĉe la konigo de lingvoprojektoj li funde okupiĝis pri la elekto, selekto kaj enlingvigo de leksiko. Li donis taskojn al siaj instruatoj pri vortanalizoj, disvolvado de signifoj kaj ties koneksoj.

[4] Esperanto-magyar teljes szótár, Kókai Lajos, Budapest, 1909.
[5] Tomán János: Esperanto-magyar szótár, Lingua Kiadás, Budapest, 1923.
[6] Tomán János: Magyar-Esperanto szótár, Lingua Kiadás, Budapest, 1924.
[7] Pechán Alfonz: Eszperantó-magyar szótár, Terra, Budapest, 1958.
[8] Magyar-eszperantó kéziszótár, Magyarországi Eszperantó Szövetség, Budapest, 1996.

Ĉe la kompilado de la vortaro Szerdahelyi procedis tiel, ke li disdonis la unuopajn literojn al siaj instruatoj kaj pli kleraj esperantistoj, kio multe akcelis la laboron. La vortaro estis tiutempe fakte pli ol simpla ĝenerala vortaro: li enigis ankaŭ fakulojn en la prilaboron de fakvortoj, ĉiam pli enhejmiĝantaj en la ĉiutaga lingvaĵo, ĉefe lingvistikaj, medicinaj, teknikaj k.s. Ĉar danke al la afiksa kaj vortkunmeta sistemo de Esperanto la vortofarado estas pli simpla, li envortarigis anstataŭ multaj unusence deriveblaj vortoj sciencajn terminojn.

La korpuson de la kolektado donis pliparte la hungara-germana kompendia vortaro[9] de Előd Halász, kaj tiun de la Esperantaj ekvivalentoj la Esperanta-germana vortaro[10] de Erich-Dieter Krause, krome la intertempe, do unue en 1970 aperinta „Plena Ilustrita Vortaro". La kompendia vortaro ne estas preskriba verko, tamen en la praktiko ĝi funkcias ankaŭ nun kiel normiga vortaro, tiel ĝi multe plifaciligis la laboron de la postaj vortaristoj.

Plenaj vortaroj

La unua efektiva provo verki plenan vortaron estis la serio de vortarbroŝuroj „Enciklopedia vortaro Esperanta-germana"[11] de Eugen Wüster, kiun li bedaŭrinde ne povis fini. Eldono de plenaj vortaroj komenciĝis efektive de la 1950aj jaroj kun la Granda Vortaro Esperanto-Franca[12] de Gaston Waringhien. Ĝin sekvis la italaj, germanaj, hispanaj, nederlandaj, ĉinaj kroataj, ĉeĥaj ktp plenaj vortaroj, kelkaj el ili, ekz. la rusa kaj portugala (ankaŭ) en cifereca formo, rete. La kompiladon de ĉi tiuj vortaroj ebligis „Plena Ilustrita Vortaro" kiel klariga vortaro krom la ĉiam pli vastiĝanta reta korpuso.

Por la unua eldono de la Esperanta-hungara plena vortaro „EHV Eszperantó-magyar szótár"[13] de Jozefo Horvath oni devis atendi ĝis 2014, por la

[9] Halász Előd: Magyar-német kéziszótár, Akadémiai Kiadó, Budapest, 1983.
[10] Erich-Dieter Krause: Esperanto-Deutsches Wörterbuch, Verlag Enzyklopädie, 1967.
[11] Ĝi aperis en 1923 ĝis 2016.
[12] Gaston Waringhien: Grand Dictionnaire Esperanto-Français, Esperantista Centra Librejo, Parizo, 1957.
[13] Horváth József: EHV Eszperantó-magyar szótár, Budapest, 1914; EHV: Esperanto-Horvath-Vortaro.

hungara-Esperanta parto ĝis 2023[14]. Ambaŭ ilin eldonis Hungaria Esperanto-Asocio.

Diferencoj inter la meza vortaro kaj la plenaj vortaroj

La meza vortaro hungara-Esperanta de Koutny-Szerdahelyi estas rezulto de konsciaj planado kaj realigo, produkto de teamo, formita ĉirkaŭ scienca centro kun apliko de la rimedoj kaj formoj de la tradicia leksikografio.

La EHV-vortaroj estas rezultoj de preskaŭ duonjarcenton traarkanta kolektado, ligebla pliparte sed ne tute al unu persono, frukto de ne konscia planado. Komence ili ekzistis nur en cifereca formo, tio longe ankaŭ difinis ilian formon depende de la disponeblaj vortarlegaj programoj. La formon, konforman al la tradicia leksikografio, ili gajnis nur poste kun konsidero al la postuloj, strukturo kaj leksikografiaj normoj de la papera formo.

Grava diferenco inter la duspecaj vortaroj estas la tempo, pasinta inter iliaj aperoj, kiu alportis grandajn ŝanĝojn en la tekniko. Sekve de la teknikiĝo ĉiam pli da vortoj penetris en la ĉiutagan lingvaĵon. La alia granda tereno el ĉi tiu vidpunkto estas informadiko, kies vortoj estas preskaŭ ĉiam, preskaŭ de ĉiuj, uzataj en la ĉiutaga vivo. Kaj la lasta evoluo, la apero de la artefarita intelekto. Ili apartenas al la plej gravaj terenoj, sed ankaŭ en aliaj rilatoj aperis nova vorttrezoro, por nur mencii politikon, la socian vivon, kie estiĝis tiaj novaj nocioj kiel senpera milito, ĉielarka koalicio, verduloj, genrismo, GLAT, vekismo, nuliga kulturo, politika ĝusteco k.s. Tiuj same postulas sian lokon en modernaj vortaroj.

Por ilustri la intertempe okazintajn ŝanĝojn en la lingvo, precipe la ampleksiĝon de la vorttrezoro, mi citas kelkajn datumojn. La meza vortaro entenas 45 mil artikolojn, 65 mil leksikajn unuojn, kio multe superas la konsiston de averaĝaj kompendiaj vortaroj. La hungara-Esperanta parto de la EHV-vortaro entenas pli ol 87 mil artikolojn, ĉ. 176 mil leksikajn unuojn en du volumoj.

La meza vortaro restis en sia siatempa stato, sed la EHV-vortaroj ne estas fermitaj. Apud la papera formo ili ekzistas ankaŭ elektronike, kio ebligas la kontinuan ampleksigon kaj korektadon.

Ĉe la meza vortaro estis donita la teamo de studentoj kaj iamaj studentoj de la fako, krome pli eta grupo de fakuloj, zorgantaj pri la terminoj. La kolektado kaj semantika analizado okazis, kiel menciite, laŭ jam redaktitaj

[14] Horváth József: EHV Magyar-eszperantó szótár, Budapest, 2003

korpusoj. La malfacilan laboron de kontrolado kaj definitivigo faris István Szerdahelyi, sed la leonan parton[15], post lia morto, plenumis Ilona Koutny. La redaktado do okazis pliparte laŭ la kutima laborprocedo. La diferenco kaj samtempe ankaŭ la malfacileco konsistis en tio, ke la unuopajn literojn prilaboris diversaj personoj, tial la unuecigo de la rezulto signifis ne malgrandan laboron por la definitiviganta ĉefredaktisto.

En la kazo de la EHV-vortaroj tamen mankis tia teamo. La Esperantan korpuson donis por la kompilanto liaj legaĵoj, radioelsendoj, ciferecaj materialoj, la vivanta lingvaĵo de renkontiĝoj, kaj, kompreneble, la meza vortaro, PIV kaj ties refreŝigitaj versioj. Tio signifis preskaŭ duonjarcentan laboron. Multe helpis al la redaktanto lia partopreno en la kompilado de la meza vortaro, redaktado de „Reta Vortaro", „Bildvortaro de Esperanto" kaj reviziado de PIV. Tio okazis resp. okazas en internacia teamo kaj retlistoj. Ĉar la signifoanalizo, redaktado restis ĝisfine en unu mano, la volumeno de unuecigo, kompilado, signifanta grandan laboron ĉe la meza vortaro, estis malmulta.

La ĝenerala kaj faka reviziadoj estis certigitaj per tio, ke la diversaj versioj de la vortaroj iĝis atingeblaj sufiĉe frue en diversaj elektronikaj formoj por la publiko, tiel la rimarkoj, korektoj, sugestoj tiam kaj ankaŭ nun relative simple povis, povas eniri la vortaron. La terminoj estis kontrolitaj, kompreneble, de fakuloj.

Dilemoj

Ĉe vortaroj difinendas antaŭ ĉio la rondo de uzantoj. Dum poŝvortaroj estas destinitaj precipe por la postuloj de lingvolernantoj, la mezgrandaj kaj grandaj vortaroj kontentigas pli ampleksajn postulojn. Ĉi tiu pli larĝa ĉerpo supozigas pli da kunlaborantoj. En normala okazo formiĝas vortarista teamo ĉirkaŭ pli elstara fakulo, kutime ĉirkaŭ universitata katedro, kiu plenumas la laboron de kolektado, selektado, slipumado, cifereca prilaboro, lasante al la (ĉef)redaktanto(j) la pli malfacilan taskon de la semantika analizo, elektado de ekzemploj.

Ĉe la redaktado de la kompendia vortaro stariĝis la demando, ĉu sekvi la normalan procedon selekti la disponeblan Esperantlingvan korpuson, poste

[15] "Leona parto" estas metaforo veninta el la Ezopa fabelo "La leona parto", kie leono dividas ĉasaĵon kun aliaj bestoj kaj prenas por si la plej grandan parton, do la esprimo "leona parto" ankaŭ en Esperanto estas "la plej granda aŭ ĉefa parto de io". (Red.)

surbaze de la realigita Esperanta-hungara vortaro pretigi la inversan flankon. Prof. Szerdahelyi rifuzis tion kun la argumentoj, ke ni devas plenumi la deziron de la esperata ŝtata eldonisto *Akadémiai Kiadó*, kaj cetere la hungara-Esperanta versio estas pli bezonata. Lia antaŭvido poste praviĝis.

Ne malgranda dilemo estas en la Esperanta leksikografio la manko de kleraj vortaristoj. Ĉar la rondo de lingvouzantoj estas pli malvasta, tiu de fakuloj eĉ malpli, la bazajn laborojn plenumas ofte kulturantoj de similaj fakterenoj.

Kun la tempo stariĝis la demando pri la portanta medio de la vortaroj. Sekve de la ciferecigo la vortar-uzado ĉiam pli transiras de la paperbazaj datumportantoj al ciferecaj rimedoj kaj al la reto. Samtempe restis sufiĉe signifa tavolo, kiu restis ekster la uzo de ĉi tiuj modernaj iloj, aŭ apud la modernaj pretendas ankaŭ paperbazajn vortarojn.

Vortaroj, pretigitaj per la tradicia prestekniko estas unuflanke tre kostaj, kaj la malgranda eldonnombro faras ilin eĉ pli kostaj, aliflanke ĝuste la koncernata tavolo, pliparte maljunaj homoj, vivantaj el pensio, ne ĉiam povas permesi al si tian elspezon, kvankam ĝuste ili bezonus tiajn vortarojn. Solvon povas doni vortaroj, produktitaj en ciferecaj presejoj, kiuj estas pli malmultekostaj kaj ne estas ligitaj al ekzemplera kvanto. Sed se konsideri la memkostan prezon de la grandaj vortaroj, pretigitaj per tia tekniko (la hungara-Esperanta parto estas ekz. duvoluma), proksiman al 35-40 eŭroj, krome la malvastecon de la eventuala aĉetantaro, estas rekoneble, ke ankaŭ ĉi tiu vojo estas ĉiam malpli facile irebla.

Samtempe ĉiam pli vasta tavolo uzas elektronikajn aparatojn. Kalkule kun tio, la elektronika versio de la kompendia vortaro sufiĉe frue naskiĝis, eĉ la programisto József Sárosi pretigis por ĝi en 2006 senkostan, tre facile uzeblan ŝelprogramon, kiu eĉ sub la nuna 64-bita operacia sistemo Vindozo 11 senmanke funkcias.

Kiel menciite, la pli fruaj versioj de la EHV-vortaroj ekzistis nur en elektronika formo. Ĉi tie menciindas la nomoj de Bernard Vivier, Gábor Deák Jahn, Gábor Bata, Eric d'Hondt, József Sárosi, kiuj redaktis vortarlegajn programojn, konformajn al la tiutempaj vortostokoj. Pli grandan problemon prezentis tamen la rutinoj, transformantaj la materialon, donitan en redaktilo, en lingvaĵon, kompreneblan por la legoprogramoj.

Nepre menciindas la bonega saĝtelefona aplikaĵo de Gábor Deák Jahn aparte por Android kaj Apple, kiuj enhavas ambaŭ flankojn de la EHV-vortaro en facile manipulebla, plaĉa formo por tre malalta prezo. Ĝia versio por

tablokomputiloj same pretiĝis por Vindozo kaj Mac. Restas ankoraŭ kiel solvo la pdf-formo, kaj ankaŭ pretiĝis tia varianto, sed ĝi estas malpli taŭga solvo pro la pli granda kapacita postulo kaj sekurecaj truoj.

En la Esperantlingva vortarskribado signifas apartan malfacilaĵon la malvasta korpuso, kompare kun la naciaj lingvoj, la malvasta rondo de parolantoj, lingvouzantoj kaj la multaj gepatraj lingvoj, pli-malpli influantaj la parolantojn. Por forigo de ĉi tiuj malfacilaĵoj sendube multe helpis la apero de la Interreto, kiu ebligas multe pli grandan ĉerpon ol tradicie, krome kelkaj, kvankam ne normigaj sed almenaŭ aŭtoritataj korpusoj, kiel ekz. Tekstaro, Kukolo, Vikipedio, la diversaj retlistoj, sociaj portaloj, okupiĝantaj pri demandoj de lingvouzo, podkastoj, kaj koncerne la terminologion, diversaj fakulaj teamoj, kiel ekz. tiu de fervojistoj, konstruistoj, juristoj, negocistoj k.s. Ties rezultoj ankaŭ aperis, aperas en la EHV-vortaroj.

La alia flanko de la malvasta korpuso estas la demando de normeco. Por fortigi ĝin, kontribuas krom la menciitaj faktoroj la decidoj de la Akademio de Esperanto, la „Oficialaj Aldonoj", la laborteamoj por „Reta Vortaro", reviziado kaj kompletigo de PIV, gramatikoj de Kalocsay-Waringhien, Bertilo Wennergren, kaj kompreneble verkoj de elstaraj aŭtoroj. Tamen eĉ por naturaj lingvoj ne signifas striktasence normajn preskribojn la decidoj de la lingvaj akademioj, sed en la kazo de Esperanto ĉi tiu relativa normeco havas eĉ malpli da orientada efiko.

Sekve de la apero de pli novaj sciencaj kampoj kaj populariĝo de terminoj montriĝas ĉiam pli forta postulo registri tiajn vortojn. La elektronika vortara formo bone kontentigas ĉi tiun deziron, kaj ŝajnas, tio estas la plej irebla vojo por daŭre ampleksigi la vortarojn, almenaŭ koncerne Esperanton.


Kiel ne planita produkto de la leksikografia laboro pri la EHV-vortaroj aperis hungara-Esperanta frazeologia kolekto [16] surbaze de „Proverbaro" de Zamenhof, „Domfabriko" de Csiszár-Kalocsay, similaj kolektoj kaj propra kolekto.

Iván Bujdosó proponis redaktadon de dulingva kolokacia[17] vortaro sur la bazo de la donitaj, jam sufiĉe vastaj vortaraj stokoj. Sed ĉi lasta estas ankoraŭ pasero en la aero.

[16] Horváth József: Magyar-eszperantó szólások és közmondások, Budapest, 2024.
[17] En korpusa lingvistiko, kolokacio aŭ kunokazemo estas serio de vortoj, terminoj aŭ esprimoj kiuj kunokazas pli ofte ol atendeble hazarde. (Red.)

Distanca Esperanto-kurso

por UEC, Universitato Espero en DRK, Afriko
de Françoise NOIREAU (Francio), desirdapprendre@gmail.com



Okazis, ke en U.E.C., Universitato Espoir en Kongolando (DRK), aperis peto de la Rektoro, Elisée BYELONGO, por instruado de Esperanto. Laŭ la peto de Renato CORSETTI al mi, Françoise NOIREAU, instruado por komencantoj komenciĝis per Zomo (Zoom). La duan jaron, mi utiligis Vacapon (WhatsApp), kiu estas la plej populara programeto tie. Kaj la aliĝantoj venis pli kaj pli de aliaj afrikaj landoj.

Tiel kreiĝis la *fakultato pri lingvoj, Esperanto kaj interlingvistiko* kun Renato CORSETTI kiel direktoro kaj Ahmad MAMDUHI kiel ĉefa helpanto de ILEI.

La tuto estas komuna projekto de UEC, UEA (vikia retejo de UEA, kie la organizado, konservado de prezentdosieroj kaj informado okazas) kaj ILEI (kursoj de EToSO-projekto; eldonado de kursoj en la jutuba retejo de ILEI).

Universitata kadro

- **Daŭro:** Lernojaro de septembro ĝis junio.
- **Registro:** Mi kompletigas liston de ĉiuj registritaj gestudentoj kun detaloj.
- **Instruistoj:** Mi kaj sep aliaj volontulaj instruistoj.
- **Klasgrupoj:**
    - Por la unua duono de la programo, ĉiu serio de 10 lecionoj kun fina skriba testo konsistigas apartan klasgrupon kun aparta instruisto.
    - Ekde leciono 51a ĝis 100a, mi estas la instruisto.
    - Ekzistas klasgrupoj por instruado per la angla kaj svahila, kaj ankaŭ por homoj kun apartaj bezonoj aŭ handikapo.
- **Parolaj Ekzamenoj:** Fine de februaro kaj junio, per videokunsido antaŭ internacia ĵurio.
- **Kosto:** Senpagaj kurso kaj diplomo, sed sen mencio de la universitato UEC (tio estas pagenda al la rektoro).

> Necesas ne nur havi kurson kaj instrui ĝin. Necesas krei strukturon por enkadrigi la instruadon. Tiu strukturo estu montrebla kaj videbla, des pli ke la instruisto kaj la studento estas nevideblaj.

Kurso de 100 lecionoj kaj 10 testoj

La kurso celas instrui Esperanton al afrikanoj, precipe en Kongolando, kaj funkcias jam tri jarojn. La instruado okazas en la franca, laŭ la postulo de la UEC-rektoro. La metodo estas rigora kaj preciza: la instruisto sendas la lecionojn unu post la alia, ĉiun kun solvenda tasko. La studento respondas en sia tempo kaj mem korektas siajn erarojn. Post ĉiu 10-a leciono, estas testo kun 10 demandoj, kaj la studento ripetas necesajn lecionojn antaŭ ol refari la teston por plibonigi sian rezulton.

Defio de distanca instruado

Utiligi Vacapon anstataŭ Zomon por la kurso ebligas individuan rilaton kaj kontrolon de ĉiu lernanto. Tamen, estas malfacile postuli regulan respondadon pro diversaj obstakloj, inkluzive de limigita aliro al komputiloj kaj retkonektoj, alta kosto de Interreto, malforta kaj neregula signalforto kaj ofte interrompita elektroprovizo. Aldone, studentoj frontas neplanitajn laborhorojn, vivnecesajn enspezproblemojn kaj oftajn krizojn. Por instigi la studentojn, oni povas memorigi pri la Zom-parolekzameno, kiu okazos en februaro kaj julio, kun eblo akiri diplomon.

Post 30 lecionoj nur deko el la registritaj studentoj plu lernas. Fine, nur unu el kvin studentoj daŭrigas sian lernadon.

Citaĵo de GADOUFIA, help-instruisto pri la unua klas-grupo:
„Lerni vacape postulas grandan motiviĝon de la lernanto, kaj instrui vacape postulas grandegan paciencon de la instruisto; konsekvence, ambaŭ koncernataj aktoroj devas engaĝiĝi por la sukceso.”

Kial Vacapo?

En Afriko, Vacapo estas vaste uzata, sed retadresoj estas malpli oftaj. Vacapo ebligas sendi voĉajn kaj tekstajn tujmesaĝojn kaj ankaŭ klarigajn bildojn, kiuj povas esti pli belaj ol tabulo-skribaĵoj.

Avantaĝoj: Vacapo estas malrigida; ĝi ebligas daŭran komunikadon inter instruistoj kaj studentoj eĉ kun elektraj paneoj aŭ aliaj obstakloj, sen tempo-premo.

Malavantaĝoj: Alta kosto de modernaj telefonoj kaj nesufiĉa memor-spaco por konservi lecionojn.

Kongruo: Vacapo ebligas socikomunikan instruadon kaj subtenas izolitajn komencantojn per grupoj kaj kanaloj.

„Komunumo" en Vacapo
Mi kreis komunumon por la kurso ĉe UEC, kiu enhavas 19 grupojn: estas 10 klasgrupoj por la serioj de lecionoj, grupo por prepari parol-ekzamenon k.s.. Ĉiu instruisto respondecas pri unu serio de 10 lecionoj kaj raportas pri la studentoj.

Aldone, ekzistas tri grandaj sociaj grupoj en Vacapo, por afrikanoj ne registritaj en UEC. En tiuj grupoj, oni interŝanĝas informojn kaj mi disdonas gramatikajn bildojn, ekzercojn kaj movadajn informojn. Ĉiu grupo havas tri nivelojn kaj la unua estas plejparte en la franca. Eblas ankaŭ serĉi en la arĥivoj de la grupo. Aliaj rimedoj inkluzivas Telegram-grupojn por fonetika trejnado kaj por printindaj kursoj.



Instruista teamo
Mi laboras kun pluraj help-instruistoj: Espoir, François, Gadoufia, Hassan, Jacques, Love, Serge kaj Victor. Pro la preskaŭ 400 homoj en tri grandaj grupoj kaj 175 registritoj en la individua distanca kurso, tio estis necesa. Ni havas apartan Vacap-grupon por instruistoj, kie mi provizas konsilojn.

La kurso per Vacapo laŭ mia metodo
La instruistoj sendas lecionojn sinsekve kaj studentoj devas respondi al tri lecionoj semajne. La unuan tagon, la instruisto kontrolas, kaj la duan tagon, la studento proponas pli bonan respondon. La kurso estas adaptaĵo de tiu de Esperanto Argentina, kun korektoj kaj modernigoj, inkluzive de pli verŝajnaj dialogoj kaj uzo de pli oftaj vortoj, verboj kaj demando-frazoj. Instruistoj ne donas respondojn, sed nur indikojn, tiel ke studentoj povu sin mem korekti. Mi provizas aldonan instruan materialon laŭ niveloj, inkluzive de bild-lecionetoj kaj kompletaj kursetoj por memlernantoj. Gramatiko estas

instruata individue, dum sociaj komunikadoj okazas en grandaj grupoj, kie mi diskonigas movadajn novaĵojn (la grupoj „Afriko 1, Afriko 2 kaj Afriko 3).

Skribaj testoj por komencantoj
La testoj en la kurso okazas per Vacapo kaj konsistas el 10 demandoj, plej ofte korektindaj frazoj por malhelpi fraŭdojn. Ĉiu demando rilatas al la samnumera leciono, do se studento eraras en demando 32, necesas retrapasi la lecionon 32. La testoj ne nur okazas post ĉiu serio de 10 lecionoj, sed ankaŭ taksas komencintojn, kiuj interesiĝas pri la kurso. Estas multe da komencantoj, sed malmultaj daŭrigas ĝis la fino kaj ankoraŭ malpli prezentas sin al la parola ekzameno.

Tabelo por raporti la progresojn
La instruistoj raportas al mi pri la finsolvitaj lecionoj kaj testoj, kiujn mi registru en ekstera tabelo. La tabelo, kun ĉiuj nomoj kaj semajnoj, montras la progresojn de studentoj, helpante identigi tiujn, kiuj ne respondis dum kelkaj semajnoj. Ĉiu instruisto havas propran koloron, tiel ke la studentoj en lia grupo havas la saman koloron, kio helpas identigi malrapidajn grupojn.

Parol-ekzamenoj
Mi organizas du parol-ekzamenojn ĉiujare, en februaro kaj julio, per Zomo. Preparado de studentoj por ĉi tiu ilo estas necesa. La ĵurio konsistas el la direktoro de la fakultato kaj la prezidanto de ILEI. Por studentoj, kiuj ne povas uzi Zomon, mi uzas mian telefonon por montri la kandidaton al la kamerao de Zomo sur mia komputilo. Por prezenti sin antaŭ la ĵurio necesas esti registrita studento en UEC kaj esti trapasinta skribajn testojn.

Diplomoj
La diplomoj estas atestiloj de ILEI. Estas tri eblaj mencioj en la du niveloj, elementa kaj meza.
Eblas akiri emblemon de UEC sur la atestilo, sed tio estas aparte pagenda al la rektoro Elisée Byelongo.

Konsiloj por instrui per Vacapo

Utiligo de Vacapo:
1. Serĉado: Vi povas serĉi en mesaĝa kesto por trovi, en kiu leciono aperis specifa nocio.

2. Redaktado: Vi povas tajpi per dikaj literoj aŭ kursive, forstreki partojn de frazoj kaj kapti ekrankopiojn kun atentigaj detaloj.
3. Voĉaj klarigoj: Vi povas antaŭ-registri voĉajn klarigojn kaj sendi ilin al via propra adreso en Vacapo, por kolekti mesaĝojn, kiuj poste povos esti sendataj al studentoj.
4. Koloraj reagoj: Vi povas uzi kolorajn reagojn por mesaĝoj, ekzemple, diversajn simbolojn kaj mienetojn.

Konsiloj pri instruado:
1. Se studento ne solvas problemon, kreu novan frazon similan al la ne-solvita unua, kaj petu vian studenton solvi la duan frazon antaŭ ol ricevi la sekvan lecionon.
2. En instruado de Fundamenta Esperanto, sekvu la konsilojn de la Akademio de Esperanto. Malakceptu erarojn en finaĵoj, tipografio, ortografio kaj supersignoj (x). Konsilu klavarojn kun supersignoj.
3. Voĉa diktado: Uzu la programeton Kõnele por pli rapide tajpi per voĉo. Elektu ĝin kiel klavaron en la tekstokampo kaj vi povos diktadi mesaĝojn en Esperanto.

Du superaj kursoj
La fakultato proponas du pliajn superajn kursojn:
1. Nivelo B2: Kurso pri historio de Afriko, instruita de D-ro Renato Corsetti.
2. Nivelo C1: Supera kurso pri enkonduko al interlingvistiko, instruata de S-ro Ahmad Mamduhi.
Por pli da informoj, bv. kontakti: <UEC-Fakultato-pri-lingvoj@groups.io> kaj <UEC-lingvo-fakultato@gmx.com>

Mirejo: kadre de UK 2024 (*Tago de la Lernado)* ***kaj ILEI-Kongreso en Brazilo (rete)***

INSTRUADO EN AFRIKO - DEFIO KAJ EVOLUO

En la kolonia tempo Francio, Britio kaj la aliaj koloniantoj decidis pri la enhavo de la instruprogramoj kaj pri la uzenda lingvo, kaze ke instruado al afrikanoj ekzistis ... En Eŭropo aperis psikologoj kiel Jean Piaget, kiu observis, kiel infano konstruas siajn kapablojn por ekkoni la mondon. Tiuj malkovroj enorme influis la instrumanieron en Eŭropo. Sed la koloniistoj ne

volis, ke Afrikanoj fariĝu inteligentaj. Do Piaget ne atingis Afrikon. Tia bremso estas plia krimo de koloniistoj.

En la afrikaj lernejoj, se estis lernejoj, oni uzis la samajn lernolibrojn, kiel en Eŭropo. En la francaj kolonioj ĉiuj infanoj devis reciti: *Nos ancêtres les Gaulois* - niaj prauloj la Gaŭloj. Stultaĵo! Pro mia alta aĝo mi konas plurajn afrikanojn, kiuj studis en tiu epoko, tio estas antaŭ la sendependiĝoj, antaŭ 1960 proksimume; ili rakontis al mi detale. En Ruando, regata de Belgio, ili devis lerni la nederlandan. Ili devis koni la nomojn de ĉiu rivero kaj kanalo en Belgio. Se ili rigardis mapon de Afriko, ili estis punitaj. En Burundo mia amikino Colette Samoya, kiu deĵoris en Ĝenevo ĉe UN nome de Burundo, do diplomatino kaj aŭtorino, rakontis pri la lecionoj pri matematiko: la tasko estis: trajno ekveturas de Bruselo je 8h47, ĝi veturas kun rapideco de 50 km/hore por atingi la urbon Namur; se oni scias la alvenhoron de la trajno en Namur, kio estas la distanco inter tiuj du urboj? Tamen en Burundo neniu infano vidis trajnon, stacidomon, lokomotivon…

Cheikh Modibo Diara estas fama sciencisto el Malio. Li verkis pri sia eksterordinara vivo; lia libro nomiĝas: *Navigateur interplanétaire (Interplaneda navigisto)*. Post longaj studoj li fariĝis kunlaboranto de NASA en Usono kaj kalkulis la itinerojn de la spacoŝipoj kaj diversaj satelitoj ĉirkaŭ la Tero kaj inter la planedoj. En tiu atentokapta kaj informriĉa libro li rakontas, ke la sendependiĝo de lia lando Malio en 1960 nenion modifis en la instruprogramoj kaj elekto de lernolibroj. Kreado de nova materialo bezonis jarojn.

Pri afrikaj lernejoj mi aŭdis jenon: lernantoj ricevas kajeron, per krajono ili kopias tion, kion la instruisto skribas sur la nigra tabulo. Tion ili devas lerni. Fine de la jaro ili devas ĉion viŝi kaj uzos la saman kajeron por la sekva jaro. Kiam mi rakontis tion, iu afrika amiko grumblis kaj kritikis min: vi disvastigas falsajn faktojn, ni havas po unu kajeron por ĉiu jaro! Tiu reago ebligas al mi substreki la abundajn diferencojn inter la afrikaj landoj. Mi aŭdis pri klaso en Ĉado kun 200 lernantoj, laŭ mia scio tio estas la maskimumo. Ofte mi vidis klasojn kun 30, 40 lernantoj. En Lomeo en Instituto Zamenhof mi vidis klason kun komputiloj. Do varias la situacioj multe, varias la disponeblaj materialoj.

En Kotonuo, Benino, mi vidis lernejon por surdaj infanoj. 80 infanoj frekventis ĝin, 50 dormis tie. Estis du klasoĉambroj, do la infanoj dormis sur la planko sur matoj, infanoj vicigitaj kiel fiŝetoj en ladskatolo. Oni diris al mi, ke diversaj NRO-oj financas la konstruadon de lernejoj. Bona intenco!

Se oni faras du, tri klasoĉambrojn, la knabinoj ne venos al la lernejo. Se oni volas, ke knabinoj venu, oni konstruu necesejojn. Ili estas necesaj! Ni ricevas abundajn fotojn de Eo-kursoj, kiuj okazas sub arbo, ekstere. Mi tute bone povus instrui tiel. Oni devas adapti sian laboron al la lokaj cirkonstancoj, kiuj enorme malsamas unu de la alia. En Burundo la klasoĉambroj en Rumonge ne havis elektron (en 2011), do ni devis fini la kurson je la sesa vespere, kiam noktiĝas.

Nun ni iru al pli kerna parto de la instruado; la unua demando estas: per kiu lingvo la instruistoj instruu? En la kolonia tempo evidente la kolonia lingvo regis. Kaj nun? Mi aŭdis en Benino, ke ekzistas kelkaj ambiciaj gepatroj, kiuj parolas la francan al sia bebo, por doni al li/ŝi pli da ŝancoj en lia/ŝia profesia vivo. Tre malofta fenomeno. La ĉiutaga lingvo estas afrika lingvo. La demando: „Ĉu vi bone dormis?" venas en afrika lingvo, ne en kolonia lingvo. Mi konstatis tion en mia hotelo Joca en Kotonuo: mi havis ĉambron kaj balkonon, kaj kurteno apartigis min de la koridoro, kie la aliaj uzantoj de la hotelo paŝis por atingi sian ĉambron. En 2020-2021 mi restadis tie dum kvar monatoj. Neniam mi aŭdis de mi konatan lingvon. Neniam. Mi povus kompreni la francan, la anglan, la hispanan, iom la portugalan, sed la fonuan ne, mina, ewe, haŭsa ne. La kolonia lingvo venas en la administrado, instruado, en la kontakto de civitano kun ŝtato, sed ne en la ĉiutagaj situacioj. La konversacioj surstrataj neniam ĝenis min dum mia laboro, mi aŭdis ilin sed ne komprenis ilin. Laŭ skemo oni povas diri, ke ĉiu infano parolas la lingvon de la vilaĝo de sia patro, la lingvon de la vilaĝo de sia patrino, kaj la lokan afrikan lingvon, kaze ke la familio migris al alia loko. En la aĝo de ses jaroj li aŭ ŝi eniras la lernejon kaj subite aŭdas la francan, devas lerni legi kaj skribi per la franca (aŭ la angla en Liberio, Ganao, Niĝerio kaj en orientafrikaj landoj). Fremda lingvo en la komenco de la lerneja vivo. Imagu la ŝokon! Tiel estas nun en plej multe da afrikaj lernejoj. Ni povas konstati, ke ĉiu afrikano estas poligloto.

En la menso de afrikanoj la lokaj lingvoj ne havas la saman prestiĝon kiel la eŭropdevenaj lingvoj, kaj tio estas trista fenomeno. Tiuj lingvoj havas sian valoron, ebligas la kontaktojn kun la parencoj, alportas sciojn pri la kulturaj heredaĵoj, pri la efiko de plantoj por higieno kaj kuracado. La tendenco estas ilia malapero, sed ni devas lukti kontraŭ tiu malapero kaj doni al tiuj lingvoj dignecon.

Mi sidis ĉe la maro kun amiko, en Kotonuo, Benino. Li diris al mi: *ĉu vi povus klarigi al mi pri la suno kaj la rondirado de la tero ĉirkaŭ la suno, pri sezonoj kaj tagoj? Mi lernis tion en la lernejo, sukcesis en la testo, poste ĉion*

forgesis. Plie ne ekzistas vortoj por tio en mia denaska lingvo. Mi prenis bastonon kaj desegnis la elipson en la sablo kaj parolis. Mi konas en Svislando la longajn tagojn de somero kaj la mallongajn tagojn de vintro. Plie mia denaska lingvo estas la franca, en kiu mi estis instruita. Mia amiko konas la ĉiam samajn 12-horajn tagojn ĉe la ekvatoro. (Kotonuo kuŝas je 7 gradoj de norda latitudo). Mi observis en aliaj momentoj, ke la en lernejo glutita studmaterialo ne estas digestita pro la distanco inter la instrulingvo kaj la ĉiutaga lingvo. Plie la instruitaj faktoj ne kongruas kun la lokaj cirkonstancoj kaj la lokaj bezonoj.

En diversaj landoj venas instruado per la loka lingvo, minimume dum 3 jaroj de la elementa lernejo. Tio estas mirinde pozitiva afero. Pozitiva pro du aspektoj. Unue, en diversaj landoj de Afriko, laŭ miaj esploroj, oni skribas la afrikajn lingvojn pere de la Internacia Fonetika Alfabeto. Do ĉiu sono kongruas kun unu signo, unu litero, ĉiam. Tio faciligas la lernadon de legado kaj skribado enorme. La alia aspekto estas, ke la infano lernas legi kaj skribi per la lingvo, kiun li/ŝi aŭdas hejme daŭre. Tiu tre efika metodo ne estas praktikata en ĉiuj ŝtatoj de Afriko, ankoraŭ ne.

Ni parolu pri ELAN: en EO Elano. ELAN estas akronimo, kiu signifas *Eveil aux Langues Africaines Nationales (Vekiĝo al naciaj afrikaj lingvoj)*. Tiu programo koncernas 9 landojn en okcidenta Afriko kaj spronas la uzon de lokaj lingvoj por la unuaj tri jaroj de la elementa lernejo. Sekvas salto al la franca. Tie la *Francophonie*, (francparolantaro), interŝtata organizo, ludas rolon kaj subtenas la salton per adekvataj instrumaterialoj. La estro de tiu programo en Togolando estas esperantisto, Profesoro Yao Afantchao. Li abunde informis min. Ankaŭ Apélété Agbolo, esperantisto, nun membras en la Akademio de la lingvo EWE kaj sekvas la disvastigon de la programo.

Mi ricevis ĉiujn dokumentojn de tiu programo. Mi ŝokiĝis observante, ke la dokumentoj enkondukas la francan sed ne konsideras la jam akiritajn kapablojn de tiuj tre valoraj tri jaroj en la loka lingvo. Oni devus doni al ili prestiĝon, ne nuligi ilian ekziston.

Mi estis en diversaj klasoj, mi aŭdis pri diversaj lernejsituacioj. Plej ofte la lernantoj – en granda nombro – aŭskultas la instruiston, respondas al demandoj, kopias tekston de la tabulo. Kompare kun mia instruado en Svislando (mia laboro finiĝis en 2008), la plej granda diferenco estas, ke en miaj kursoj ĉiam okazis diskutoj. La lernantoj starigis demandojn, mi respondis, ofte mi reagis per alia demando, la lernantoj devis **argumenti**. Ili

konstante estis en komunikado inter si kaj kun mi. Iu el ili diris: En via kurso ni ne povas dormi! Kadre de nia Movado mi devis prepari kaj korekti multajn ekzamenojn pri lingvokapablo en Esperanto kaj mi konstatis, ke ofte en Afriko lamas la kapablo argumenti. Tio estas esprimi komparojn, sintezojn, analizojn, resumojn, reliefigi kaŭzojn kaj konsekvencojn. Tio devenas de la magra instruado ricevita en la publikaj lernejoj en grandaj klasoj. Mi tre esperas, ke tio pliboniĝas kaj pliboniĝos. En miaj klasoj estis 20 lernantoj, eble 22 aŭ 23. En ĉiu semajno mi havis duonan klason por instrui fremdan lingvon; do mi povis paroligi proks. 10 lernantojn. Evidente la rezulto estas alia. Kompreneble tia instruado kostas pli al la ŝtato.

En Afriko kiel en la cetera mondo la geinstruistoj havis prestiĝon. Ili estis la sciantoj en la vilaĝoj. Nun regas radio, televido, telefonoj, iu povas suĉi la sciojn per si mem. Do la prestiĝo de la instruistoj falas. Lerni kaj obteni diplomon por fierigi siajn gepatrojn, tio regas en Afriko. Mi vidis afiŝojn surstrate: studu ĉe ni kaj fierigu viajn gepatrojn. Plie aŭdiĝas foje postuloj de ambiciaj gepatroj; ili venas kun subtabla donaco por *subaĉeti* la instruiston, por ke li/ŝi donu bonajn poentojn al la infano. Aŭ patro venas kun tranĉilo kaj minacas. Se oni mencias la magran salajron de multaj instruistoj en diversaj landoj, oni povas dedukti, ke la geinstruistoj estas tre kuraĝaj kaj sindonemaj personoj.
Ni memoru pri la frazo de Nelson Mandela: La plej potenca armilo por ŝanĝi la mondon estas Edukado. Edukado devas esti prioritata kampo en la buĝeto de la ŝtatoj. Bonaj salajroj por la geinstruistoj, adekvataj lernejoj, klasoĉambroj kaj materialo, ne nepre luksa, sed sufiĉa, ne tro grandaj klasoj, (ju pli granda la klaso, des pli malofta estas la partopreno, aktiveco de ĉiu infano). Devas okazi bona baza lertigado de la geinstruistoj kaj perfektigaj kursoj dum ilia tuta kariero. Tia prioritato por bona instruado estas tre valora investo. Ne ĉiuj ŝtatestroj kaj parlamentanoj konscias pri tio. La mondo bezonas pliajn Julius Kambarage Nyerere.

Resume:
1. Eŭropanoj ne evoluigis la lernejojn dum la kolonia tempo.
2. Samaj programoj kaj lernolibroj regis en Afriko kiel en Eŭropo.
3. Okaze de sendependiĝo oni ne tuj povis produkti adekvatajn lernolibrojn en la adekvata lingvo kaj kun la adekvata enhavo.
4. La instrusituacio, materialo je dispono, varias enorme de lando al lando, de urbo al kamparo.
5. Lernantoj pasivaj, akiro de scioj nur surfaca, ne digestita. Tikla elekto de instrulingvo.

6. ELAN: uzo de afrika lingvo en la elementa lernejo, tre pozitiva paŝo.
7. Malfacilaĵoj por la geinstruistoj, ili estas herooj.
8. La ŝtatoj devas doni pli da graveco al la kvalito de instruado.

Aldono post aŭskultado de la prelego de Mulele Mbassa, ILEI-sekciestro por Tanzanio, okaze de la Tago de la Lernado kadre de la UK 2024 en Aruŝo, Tanzanio:
Tanzanio havas du oficialajn lingvojn: la svahilan kaj la anglan.
En Tanzanio la instruado en baza lernejo okazas en la svahila. En kelkaj lernejoj kaj ĉefe en privataj lernejoj la instrulingvo estas la angla. Instruado en aliaj afrikaj lingvoj ne oftas.

Tra miaj spertoj …

Karaj samprofesiuloj,
Mi lernis Esperanton sub la gvido de Claude GACOND en La Chaux-de-Fonds kaj bone memoras pri spacoŝipo, kiu simbolas frazon. Nun mi ricevis de mia kolegino Nicole MARGOT belan tekston, kiu priskribas tion. Do mi kun plezuro cedas al ŝi mian spacon; same vi kiel ni flugos per tiu amuza spacoŝipo kaj vi povos uzi tiun strategion en via instruado.


Mireille GROSJEAN

Claude Gacond kiel pedagogo[18]

La esperantistoj, ĉefe la svisaj, ŝuldas multon al Claude, unue pri la kreo de CDELI (Centre de Documentation et d'Étude sur la Langue Internationale), sed ankaŭ pri la iamaj radioelsendoj en Esperanto, la kreado kaj dumjara mastrumado de KCE, la prezidado de la svisa junalaro kaj poste de SES, sed ni ne devas forgesi lian pedagogian agadon. Ni jam diris, ke li estis tre ŝatata instruisto en La Sagne kaj en La Chaux-de-Fonds. Sed gravas aldoni, ke li instruis ankaŭ Esperanton en siaj klasoj kaj kontaktigis siajn lernantojn kun esperantistoj el aliaj landoj kaj kontinentoj.

[18] Pri tiu temo kaj pri aliaj de Claude bonvolu vidi Claude GACOND - L'espéranto en pratique / Esperanto praktike: www.esperanto-gacond.ch

Pens-veturilo



Sed mi ŝatus diri tie kelkajn vortojn pri lia kreo de metodo por instrui la lingvon ankaŭ al plenkreskuloj. Li tre profunde repensis tiun instruadon, respektante la veran strukturon de la lingvo. Tion ni povas konstati en liaj tre klaraj gramatikaj afiŝetoj. Claude volis distanciĝi de la kutimaj gramatikaj terminoj kaj krei proprajn terminojn, kiujn li opiniis pli kongruaj kun la gramatika funkcio de la lingvo. Ekzemple la „frazo”n li nomis „**pensunuo**”, bildigita per la „**pensveturilo**”, „**pilotata**” de la „subjekto”; la „**nepilotajn**” funkciojn ĉu necese enkondukas prepozicioj, aŭ ili estas markitaj de la **e**-finaĵo, ĉu de la **n**-finaĵo.

Same klare li montris ke la **vortelemento**, laŭ la vortaro, „**emas**” al la finaĵo **-o**, **-a**/**-e**, **-i**, aŭ ne posedas gramatikajn finaĵojn kiel „jes”, „ne”, „ankaŭ”, „ĉu” ktp. Nur konante **tiun „emo”n de la vortelemento** ni povas konstrui vortojn tiel libere kiel ni facile propagandas. Tre konata ekzemplo de tio estas la „broso” kaj la „kombilo”, kiu unuavide, sen koni la „vortelementajn emojn” povus kredigi, ke Esperanto ne estas tiom regula kiel oni asertas. Ĉar „broso” estas „o-ema” ĝi ne bezonas la sufikson „-il” sed, ĉar „kombi” estas „i-ema”, „kombo” signifas la agon „kombi”.

Li ankaŭ prave insistis pri la neceso koni la transitivecon aŭ ne-transitivecon de verboj (**la unubrakajn kaj dubrakajn**) por la malfacila uzo de „**iĝ**” kaj

„**ig**”. Anstataŭante kelkfoje Monika Molnar por la instrusabatoj de CDELI, mi povis konstati kiom tiuj bazoj mankas al esperantoparolantoj kaj tion oni ankaŭ povas aŭdi en kongresaj malfermoj, kiam ofte diriĝas, ke „la kongreso komencas” anstataŭ „komenciĝas” ĉar „komenci” estas transitiva. Ja, preskaŭ ĉiuj el ni povas simile erari en tiuj bazaj konoj.

Ni ja povus pli detale paroli pri la specifaj alportoj de Claude al Esperanto-pedagogio kaj pli profunde studi la „gakondan” metodon sed gravas unua-etape ne forgesi tiun ĉi aspekton de la agado de Claude Gacond.

Nicole MARGOT

Lernejoj kaj demokratio



Dum jaroj mi instruis civitanecon al gelernantoj en la aĝo de 14-15 jaroj. La kurso havis 3 instruhorojn semajne (3 x 45 minutoj). La traktendaj temoj estis la historio de la dudeka jarcento, la politikaj strukturoj svisaj, la funkciado de la amaskomunikiloj. La instruisto havis ian liberecon, sendependecon, en la tolerema Svislando. Eble mi rakontos al vi okazintaĵojn de tiu kurso. Jen unu por hodiaŭ:

Okazis normalaj trankvilaj lecionoj, kaj okazis eksterordinaraj momentoj kaj renkontiĝoj. Okazis, ke mi klarigis al miaj lernantoj: „Mi ne povus instrui en Francio”. Fakto estas, ke la franca himno entenas kruelajn versojn, kiujn mi ne povus, mi ne pretus instrui al infanoj. Sekvis diskuto, kiel ĉiam. Diskutoj eblis, ĉar mi havis antaŭ mi 20 aŭ 22 gejunulojn, do mi povis doni al ili la parolvicon. Ili devis lerni esprimi sin kaj argumenti.

La instruado estas en la manoj de pedagogoj, sed la koncepto de la instruprogramoj kaj la finaj postuloj estas en la manoj de politikistoj, ofte aprobitaj de la parlamento de iu ŝtato, foje verkitaj de la ŝtatestro mem. Kelkaj ŝtatestroj prezentas modifitan historion pri sia lando. La geinstruistoj devas sekvi, sendepende de siaj personaj pozicioj. La strecoj povas esti

fortaj, fortegaj. Povas okazi perdo de laborposteno aŭ pli severaj punoj. Aŭ la instruisto silentu pri siaj konvinkoj kaj suferu. Aŭ li aŭ ŝi elektu alian profesion aŭ forlasu la landon. Do ni vidas, ke instruado kaj demokratio ne vivas sub la sama tegmento.



La lernejo „La Granda Ursino”

Diversaj pedagogoj kiel Célestin Freinet donis la liberan elekton al la gelernantoj kaj geinstruistoj pri tio kiel akiri la sciojn, kaj la lernejoj de tiu Movado estas mem-mastrumataj. Tie infanoj floras, kreas, pripensas, kontribuas. Motivitaj estas tie la infanoj kaj la plenkreskuloj, la gvidantoj.

En la publiko oni ne ĉiam komprenas tian pedagogion. La gepatroj ĉiam kaj ĉie havas gigantajn atendojn pri la lernejo kaj la instruado, kaj havas postulojn al la instruistoj por certigi brilan estontecon por sia infano. De ekstere la gepatroj ne bone povas sekvi la vivon de tiaj institucioj. Pro tio la gvidantoj devas dediĉi tempon kun la gepatroj por klarigi la metodon.

Mireille GROSJEAN

Ĉinio


Novaĵoj el Zaozhuang

De la aŭtuna semestro de 2024 la nun tria-jaraj studentoj de la Esperanto-fako ĉe la Universitato de Zaozhuang ne plu havas nur kursojn pri la lingvo mem, sed komencis lerni ankaŭ aliajn studobjektojn pere de ĝi. Mia korea kolego Dekmil (Choi Manwon), kiu doktoriĝis pri la Historio de la Ĉina Komunisma Partio el ĉina universitato kaj do flue parolas la ĉinan, daŭre zorgas pri la progresiga lingvo-kurso. Dum niaj junaj ĉinaj kolegoj Nuba (Long Yunxia) kaj Briko (Li Bochuan), kiuj magistriĝis pri Esperantologio en Poznano, pritraktas la parton pri tradukado de la teoriaj kaj praktikaj vidpunktoj, laŭ la vojo malfermita de la bedaŭrinde forpasinta japana profesoro Sasaki Teruhiro per siaj esperantigoj de ĉinaj filozofiaj klasikaĵoj.



Studentoj de Scienco kaj Teknologio kun ventumilo pri Saĝa Steleto


La pasintan semestron mi instruis Esperantan literaturon, de la komenco ĝis Kálmán Kalocsay, kaj Esperantan ĵurnalismon. Tiu ĉi lasta ebligis diskuti la situacion de Esperantaj komunikiloj en la epoko de konverĝo, kiu pliigas la dividon inter grandaj grupoj (kiel Ĉina Komunikila Grupo, kiu efektive kunigas la fortojn de la Esperanta sekcio de Ĉina Radio Internacia kun la ŝtata televido CCTV) kaj niĉ-ĵurnalismo, malfermante novajn oportunojn por ambaŭ. Por la praktika parto de la kurso ĉiuj studentoj devis analizi Esperantan revuon, kiun ili mem elektis, verki artikolon taŭgan por ĝi kaj mem kontakti la redaktoron por peti publikigadon. Ĝis nun aperigis la artikolojn aŭ promesis publikigon *Esperanto aktuell*, *Esperantolehti*, *Horizon-Taal*, *Internacia Pedagogia Revuo*, *La Konga Stelo*, *La Normanda Bulteno*, *La Ondo de Esperanto*, *Le Monde de l'Esperanto*, *Starto* kaj *Tempo*. Grava defio de la kurso, kiu certe utilos al la studentoj ankaŭ por iliaj sekvaj studoj kaj agadoj, estis kompreni kiel alloge prezenti siajn pensojn al specifa publiko.



Kurso al la volontuloj de la Studenta Esperanto-Klubo

Ĉi semestron mi instruas en Esperanto kurson de Interkultura Komunikado, kiun mi jam instruis angle al la samaĝuloj de la angla fako dum pluraj semestroj. Ĝi ne uzas lernolibron, sed mi adaptas ĝin ĉiufoje laŭ la interesoj de la studentoj. La baza ideo de la kurso estas ne nur privilegii la antropologian signifon de kulturo kiel vivmanieron - kiel kutime okazas en tiaj kursoj pro la historiaj kondiĉoj de la formado de la fako en Usono post la Dua Mondmilito - sed ankaŭ substrekti altan kulturon kaj pop-kulturon. Tiu aliro bone funkcias en la ĉina kunteksto, kie studentoj kutime konas pri okcidentaj historio, filozofio, literaturo kaj arto pli ol tiom, kiom iliaj eŭropaj aŭ amerikaj samaĝuloj scias pri la ĉinaj. Ĝi krome ebligas havi malfermajn okulojn al la nuntempaj ŝanĝoj en socio, kie ekzemple pluraj ĉinaj animacioj estas gajnantaj la unuajn lokojn mondskale pro la preferoj de la internacia publiko, aŭ kie kreskas la fervorulinoj de koreaj pop-muzikaj grupoj. Klare povi libere interparoli pri ĉiuj tiuj niveloj ne povas ne fortigi interkulturan komunikadon, helpante trovi komunajn interesojn kaj scivolemojn trans lingvaj baroj.

La alia kurso, kiun mi instruas al la studentoj de la Esperanta fako ĉi semestron estas adaptiĝo de „Kernaj Konceptoj de Komunikado", origine dezajnita de John Durham Peters, prestiĝa profesoro de la Universitato Yale en Usono. Mi estis diplomiĝinta asistanto por li dum pluraj semestroj ĉe la Universitato de Iowa en Usono. Kaj mi gvidis diskutan kurson ĉe la Artkolegio de Kunming pri lia plurlingve tradukita libro *Speaking Into the Air: A History of the Idea of Communication* (*Paroli al la vento: Historio de la ideo de komunikado*. 1999), sur kiu „Kernaj Konceptoj" baziĝas. Kvankam ĝi estas pli malfacila ol la aliaj kursoj, estas plezuro vidi la studentojn de la Esperanta fako vere klopodi kompreni la diskutojn pri amo, retoriko kaj skribo en la *Fedro* de Platono kaj ĝeneraligi iliajn signifojn por pridiskuti la evoluojn de komunikiloj kaj komunikado en nia mondo. Tiusence la kurso daŭrigas la kritikan pripensadon, kiun ni komencis pasintan semestron pri Esperanta ĵurnalismo, kaj pli profundigas ĝin. Espereble similaj aliroj kaj spertoj stimulos la esperantigon de fundamentaj tekstoj de la okcidenta kulturo, kiel la dialogoj de Platono, kiuj estus grava aldono al la instruado pri humanismaj kaj sciencaj fakoj pere de la internacia lingvo.



Studento de Scienco kaj Teknologio faris ventumilon pri Saĝa Steleto

Intertempe ni daŭrigas la nedevigan instruadon de Esperanto al la studentoj de la angla kaj de sciencaj kaj teknikaj fakoj, kiuj montras ĉi semestron grandan intereson, eble ankaŭ dank' al la sukcesoj de la ĉina artefarita inteleko Deepseek. Same estas pri la neoficialaj lecionoj al la volontuloj de la Studenta Esperanto-Grupo, kiu havas nun 40 membrojn. Sub la gvido de S-ro Semio (Sun Mingxiao) ni ankaŭ daŭre prezentas la internacian lingvon en lokaj mezlernejoj, inkluzive de unu apartenanta al la najbara urbo Jining, proksima al la plej granda lago en norda Ĉinio, kie instruas jama volontulino de la Esperanto Muzeo ĉe la Universitato de Zaozhaung. Fine, eble menciindas, ke en februaro 2025 mi sukcesis iom paroli pri niaj agadoj dum publikaj eventoj en Italio. Mi fakte prezentis tradiciajn vilaĝajn ceramikaĵojn de la provinco Shandong, kiujn tria-generacia loka artisto donacis dank' al Esperantaj rilatoj, dum la tria „Teo kaj Amo" ĉe la Muzeo pri Ĉina Arto kaj Etnografio de Parmo. Raporto pri la novaĵo aperis en la ĉina en la ĉefpaĝo de la retejo de la Universitato de Zaozhuang, kaptante la atenton de multaj kolegoj kaj studentoj. Kaj mi prelegis pri mia animacio en Esperanto *La aventuroj de Saĝa Steleto kaj de la Mirinda Teamo* kiel formo de utopia

komunum-konstruado dum la internacia konferenco „Difference, Diaspora, and the Nation" (Diferenco, Diasporo kaj la Nacio) ĉe la Universitato de Milano. Mi tie menciis niajn kursojn kaj agadojn kaj ricevis interesajn demandojn de la publiko.

Alessandra MADELLA

Germanio

SEP-10 – Somera Esperanto-Perfektigo en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, Germanio 1. 11.-18.07.2025 kaj/aŭ 2. 18.-25.07.2025

Intensaj Esperanto-lingvokursoj por Komencantoj (A1-A2) kaj Progresintoj (B1-B2). Ambaŭ semajnoj ankaŭ kiel instrukapabligaj klerigmoduloj por instruemuloj (B2-C1), kun observado, konsilado, provinstruado.

Ĉiutage: 6 instruhoroj

- Posttagmeze: ekskursoj, naĝado, biciklado, promenado, festoj, tamtamado, ktp.
- Vespere: Filmoj, muziko, ludoj, babilado, literaturo, ekskursoj, rostadfesto

Kurskotizoj: 1 semajno: 170 €, 14 tagoj 290 €
Rabatitaj kotizoj: ekz. por studentoj! GEA-membroj: 20%, EGS-membroj: 35% rabato
Tranoktebloj (kostoj po persono kaj nokto). Ni peras por vi!

1) Favorpreza Esperanto-tranoktejo: 30,00 €
2) Hotelo (2-4 stela, kun matenmanĝo): 40-70 €
3) Privata apartamento (se min. 2 personoj): ĉ. 30 €
4) En propra tendo: senkosta

Aliĝo, detaloj: Germana Esperanto-Centro, esperanto-zentrum@web.de, Tel. +49 5521-5983

Zsófia KÓRÓDY

Hungario

GADOS László (1932-2025)



Nia komunumo funebras: forpasis instruanto.

Kvankam li konatiĝis kun Esperanto junaĝe, nur post la emeritiĝo, en la 90-aj jaroj, li komencis vere okupiĝi pri ĝi. Li instruis Esperanton al siaj genepoj, kaj por fari tion profesinivele, li ne nur perfektiĝis en la lingvo, sed studis ankaŭ metodologion en la kurso de HEA.

Li akompanadis la du infanojn al renkontiĝoj, partoprenigis ilin en deklam-konkursoj. Samtempe li instigis ankaŭ sian filinon eklerni la lingvon, helpante ŝin iĝi ELTE-diplomita instruisto ankaŭ pri Esperanto.

Tiel li zorgis pri sia trigeneracie E-lingva familio.

Li ege entuziasmis pri la lingva logiko de Esperanto, sed samfervore li okupiĝis pri lingvopolitikaj demandoj. Li korespondadis pri tio kun ŝtataj kaj Eŭrop-Uniaj instancoj, prelegis tutlande kaj verkis artikolojn, plurajn librojn pri la temo.

Liaj teoriaj kaj praktikaj agadoj estis ekzemplodonaj. Ni ja funebras nun, sed ni sentas ankaŭ dankĝojon, ke nia komunumo havis tian instruanton. Dankon, kara Kolego!

Márta KOVÁCS

La 58-a ILEI-kongreso en Beogrado, Serbio (19-a-26-a julio 2025)

Ĉu vi volas travivi la ĉarmon de Beogrado kaj gastamon de Serbio?

Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj organizas tie sian ĉefeventon por ĉiuj, ne nur por instruistoj, sed ankaŭ por instruontoj, instruantoj, instruemuloj, akompanantoj kaj familianoj je ĉiuj niveloj de lingvoscio. Ni ĉiuj havos la eblon loĝi en la sama hotelo: Hotelo Palace, kiu estos ankaŭ nia kongresejo, kaj la ejo por loĝado kaj manĝoj.

La programo estos kleriga, intensa kaj kulturplena. Ni diris por ĉiuj lingvoniveloj, ĉar ni havos kursojn por komencantoj/komencintoj, kaj progresigan paroligan kurson, prelegojn kaj simpozion.

La temo de la kongreso kaj la simpozio estos „Artefarita intelekto kaj lingvolernado". Ne mankos la lingva festivalo, la ekskursoj, la artaj vesperoj.

Pliaj detaloj, aliĝilo, mendilo: https://2025.kongreso.org/ilei-chefa.html

Aliĝu rekte: https://2025.kongreso.org/alighilo.html

Ĉion ĉi vi povos sperti ĉe la kongreso! Ĝis nun aliĝis 114 partoprenontoj el pli ol 20 landoj kaj kun multe da afrikanoj, ĉefe burundanoj.

Laura BRAZZABENI
Estrarano pri kongresoj de ILEI

Alvoko al la ILEI-Simpozio Beogrado, 24-a–25-a julio 2025

La 58-a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), okazos en Beogrado (Serbio), de la 19-a ĝis la 26-a julio 2025. Enkadre de tiu hibrida evento, okazos ankaŭ nia jam tradicia ILEI-Simpozio, kies ĉeftemo estos: „Artefarita intelekto kaj lingvolernado".
Per tiu temo ni celas diskuti kaj analizi la eblajn aplikojn de Artefarita intelekto (AI) en instruado kaj lernado de lingvoj – precipe de Esperanto. Ĉar AI estas ne nur aktuala, sed ankaŭ rapide evoluanta kampo, ni invitas vin interŝanĝi spertojn, ideojn kaj opiniojn pri lingvolernado kun ĝia helpo aŭ per ĝi.
La simpozia ĉeftemo certe vekos intereson ne nur de esperantistoj, sed ankaŭ de profesiuloj pri instruado de aliaj lingvoj kaj fakoj ligitaj al Artefarita intelekto; kaj ankaŭ de universitataj esploristoj kaj profesoroj, kiuj certe trovos en ĝi ne nur interesan materialon por estontaj esploroj sed ankaŭ ampleksigos la diskutojn pri AI kaj lingvoinstruado.
La ILEI-Simpozio okazos en hibrida formo la 24-an kaj 25-an de julio kaj estos malferma por (ne)esperantistaj fakuloj kaj interesatoj, ebligante ilian diskuton pri temoj de komuna intereso observataj el diversaj vidpunktoj.

Celante diversaspektan traktadon de la simpozia ĉeftemo, oni komprenas ke ĝi inkluzivas, sed ne limiĝas al la jenaj subtemoj:

- Artefarita intelekto kaj lingvolernado
- Artefarita intelekto kaj lernado de Esperanto
- Specifaj metodikaj defioj en lingvoinstruado

- Rolo de retaj teknologioj en edukado
- Esperanto kiel didakta ilo por instruado de aliaj fakoj
- Instrumaterialoj.

Se vi deziras prelegi pri tiu ĉi temaro, aŭ mem proponi novan temon, ni tre kore invitas vin sendi vian prelegproponon al ilei.kongresoj@gmail.com, kopie al magisterpita@gmail.com. (Limdato: la 31-a de majo 2025.)
Viaj prelegoj devas esti originalaj, ne publikigitaj nek planataj por publikigo aliloke. Viaj prelegresumoj estos publikigitaj en la Kongresa Libro, kaj plenaj prelegtekstoj en Simpoziaj Aktoj. Por via prelego vi disponos pri 20 minutoj, kun 10 minutoj por diskuto.
Ĉiuj aliĝintoj de la kongreso aŭtomate rajtas partopreni en la simpozio sen apartaj aliĝilo kaj kotizo. Tiuj, kiuj volas aliĝi nur al la simpozio, kiel preleganto kaj/aŭ aŭskultanto, povas uzi la saman kongresan aliĝilon kaj pagi la nur-simpozian kotizon (ĉi-kaze, kontaktu nin prie). Bonvenon!
Organizado fare de: Fernando Pita kaj aliaj ILEI-estraranoj.

Aldonaĵo 1.: Ŝablono de prelegpropono
Via prelegtitolo, Via plena nomo, Via institucio (ILEI, AIS, Universitato de … , aŭ simile)
Resumo: Ĉi tiu ŝablono difinas strukturon kaj enhavon de ILEI-simpoziaj kaj aliaj ILEI-kongresaj prelegproponoj. Por resumi vian prelegon bonvolu uzi 100-200 vortojn.
Ŝlosilvortoj: 3-5 ŝlosilvortoj
Aŭtoro: Por prezenti vin kiel aŭtoron bonvolu uzi maksimume 150 vortojn. Via preskvalita foto estu aldonita en aparta dosiero.

INFORMOJ PRI ILEI

Laborkomisionoj

Ekzamena: Karine Arakelian (*prez., dumtempe pluservanta ĝis la venonta elekto*)
Elekta: Aurora Bute (gvid.), Zsófia Kóródy, Aristophio Alves Filho.
Kontrola: Simon Smits, Nvard Manveljan.
Lerneja: Julián Hernández, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Marija Jerković, Luigia Oberrauch, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi.
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Stefan MacGill.
Terminara: Miroslav Malovec, Ilona Koutny.

Universitata: Duncan Charters (gvid.), Renato Corsetti (✞), Gong Xiaofeng „Arko", Goro Kimura, Ilona Koutny, Katalin Kováts, Kristin Tytgat, Vicente Manzano-Arrondo, Radojica Petrović, Ivan Colling.

Enmovadaj partneroj (entute 15)

E@I (*Edukado ĉe Interreto*): Víťazná 840/67A, SK-958 04 Partizánske, Slovakio, *info@ikso.net*. Tel: (+421) 902 203 369. Retejo: *http://www.ikso.net/eo/.*

Fondaĵo edukado.net - funkciiganta la paĝaron de instruistoj, instruantoj kaj memlernantoj. Direktoro: **Katalin Kováts**, Spaarwaterstraat 74, NL-2593 RP, Den Haag, Nederlando. Retadreso: *redaktanto@edukado.net.*

ICH (Interkultura Centro Herzberg): Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg am Harz, (+49) 55215983. Trejnsesioj, metodikaj kursoj, pedagogia fakbiblioteko, internaciaj ekzamenoj, kontaktpersono: **Zsófia Kóródy**, *zsofia.korody@esperanto.de.*

IFEF (Internacia Fervojista Esperanto-Federacio): *vd. la retpaĝon de UEA.*

TEJO (http://www.tejo.org/): Observanto de ILEI ĉe TEJO: **Aimé-Patrick Manirakiza**. Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Albert Stalin Garrido.**

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando, *www.uea.org*. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Ahmad Reza Mamduhi.** Observanto de UEA ĉe ILEI: **Duncan Charters.**

LIBE (Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj): prez. **Nedeljka Ložajić**, *nedeljkalozajic@gmail.com*.

kaj aliaj

Ekstermovadaj partneroj (entute 8)

ALTE *(Asocio de lingvaj testistoj de Eŭropo)* Repr. de ILEI: **Zsófia Kóródy**.

FIPLV *(Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj)*

UN (kun statuso de observanto): komisiitoj de ILEI: **Rob Moerbeek, Ron Glossop, Leysester Miro.**

Unesko (kun statuso de observanto): Reprezentantoj de ILEI: **Alessandra Madella,** *a.madella@tiscali.it*, **Didier Janot,** *didier.janot@gmail.com,* **Emmanuel Desbrières** kaj **Maximiliano Garcia**.

kaj aliaj

Membreco kaj pagado por diversaj servoj

Membreco kostas 25 € en A-landoj kaj 12,50 € en B-landoj, kun ricevo de 4 paperaj kaj bitaj numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al la reta versio de IPR membreco kostas 12,50 € por la A-landoj kaj 6,25 € por la B-landoj. Supera membro estas tiu ILEI-membro, kiu mendas paperan IPR kaj paperan *Juna Amiko* (JA). Tio kostas por A-landanoj 40 € kaj por B-landanoj 22,50 €. Abono de JA papera (kune kun la bita) kostas 18 € en A-lando, 13 € en B-lando. Abono de JA bita kostas 11 € en A-lando, 7 € en B-lando. **Lando-kategorioj: B-landoj**: iamaj socialismaj landoj de Eŭropo; ĉiuj landoj de Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Resp.), Afriko, Ameriko (escepte de Usono kaj Kanado), Kiribati, Papuo-

Nov-Gvineo, Solomonoj, Vanuatuo en Oceanio. **A-landoj**: ĉiuj landoj escepte de tiuj de kategorio B. Bonvenaj estas donacoj al la kaso de ILEI kaj al la fondaĵoj de ILEI. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas kotizojn kaj donacojn; simile, perantoj por JA akceptas abonojn enlande.

Por informi pri viaj pagoj, bonvole skribu al **Karine ARAKELJAN**, 33 Khandjian Str., Apt. 4, AM-0010 Erevan, Armenio, *ilei.kasisto@gmail.com*. Bv klare indiki la celon de via pago.
La pagoj por ILEI povas okazi a) pere de via sekciestro aŭ b) pere de la ILEI-konto ĉe UEA. Jen detaloj:
a) Pagoj al la sekciestro alvenos al ILEI kune kun tiuj de la aliaj membroj de la sekcio. Vi jam estos en la sekcia listo kaj ne devos mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon.
b) Pagoj al la konto de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Se vi ne mem posedas UEA-konton, por pagi al UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL 3015 BJ Rotterdam, bv uzi: ING Bank, Postbus 1800. NL-1000 BV Amsterdam (konto: 37 89 64; IBAN: NL72INGB0000378964; BIC/SWIFT: INGBNL2A). Bonvolu aldoni € 5 por la nederlandaj bankokostoj. Se vi ne estas en la sekcia listo, bonvolu mem sendi la aliĝ- aŭ la abon-formularon (aliĝilo: https://www.ilei.info/Aligxilo.pdf; abon-formularo por *Juna Amiko*: https://www.ilei.info/Juna_Amiko.pdf). Indiku vian nomon kaj vian landon, la celon de via pago kaj la konton de ILEI ĉe UEA: ilek-a. Ĝiri monon el via UEA-konto al la ILEI-konto ĉe UEA estas facila ago.

* Simpla abono de *IPR* sen membreco: 30 €. Reklamtarifoj por *IPR*: 180 € por plena, 110 € por duona, 70 € por kvarona paĝo. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon; kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.
* ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag (NL) sub la numero 27181064 kun sidejo ĉe la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo (NL).
* Retpaĝo de ILEI: *http://www.ilei.info*.

REDAKCIAJ INFORMOJ

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Marc CUFFEZ, *Torhoutsesteenweg 453/0003, BE-8400 Oostende*. **Teknika helpo**: Stano MARČEK. **Presado**: Alfaprint, Martin, Slovakio. **Redaktoro**: NÉMETH József, *Fő u. 41/5, HU-8531 IHÁSZ, Hungario, jozefo.nemeth@gmail.com*, tel*: (+36-70) 931-0530*. Peranto de ILEI kadre de LIBE: Olena Poshivana, *olenaposivana@gmail.com*.
La adreso de nia arkivo: https://www.ilei.info/revuoj/ipr-arkivo.php.
Ni fermis la nunan numeron la 15-an de januaro 2025,
redaktofino por la sekva numero: la 15-an de aprilo 2025.





Instruado en Afriko (vd. p. 21)